

# *La Riverego* *kebekia esperantista bulteno*

Junio 2005

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 20, No 80

## Intéressant pour une société française...

**Joseph Országh**

Le groupe Ceva est une société française spécialisée dans la fabrication de médicaments vétérinaires dont le siège social est situé à Bordeaux. L'entreprise est aussi bien implantée en Hongrie.

Jusqu'en 1996, on y engageait du personnel hongrois parlant français. La langue du travail était le hongrois, tandis qu'au niveau des cadres, le travail se faisait en français. Tout était traduit aussi en hongrois. Le bilinguisme français-hongrois fonctionnait bien dans l'entreprise.

En 1996, les cadres ont reçu un ordre provenant de la direction située à Bordeaux suivant lequel, désormais la langue du travail doit être l'anglais. On a progressivement «viré» le personnel hongrois parlant français pour le remplacer par d'autres qui parlent (plus ou moins) l'anglais. L'enseignement du français a bénéficié d'une grande tradition en Hongrie, ce qui n'était pas le cas pour l'anglais. On essaie actuellement de combler cette lacune.

Dans l'entreprise; depuis le passage au tout anglais, il y a des problèmes énormes dans la rédaction des rapports scientifiques et des propositions d'homologation des médicaments, car en fait personne dans la filiale de Budapest ne maîtrise réellement l'anglais. On a donc engagé (avec un gros salaire) un cadre australien dont le travail est de corriger les fautes d'anglais dans tous les documents externes et internes.

Vu les difficultés de rédiger correctement en anglais, récemment, tous les cadres de l'entreprise ont été obligés de suivre une semaine de formation linguistique. Cette formation était nécessaire, à cause des confusions scientifiques constatées dans les rapports de laboratoire rédigés par des Français et des Hongrois qui ne maîtrisent pas bien l'anglais.

Actuellement, les rapports techniques pour l'homologation des médicaments vétérinaires pour être commercialisés en France doivent être transmis aux autorités françaises en anglais. Les documents transmis en français sont refusés. On tolère encore la rédaction en français uniquement pour la lettre d'accompa-

gnement des documents qui eux, doivent être rédigés en anglais.

La pression est énorme, pour obliger le personnel français à utiliser uniquement l'anglais, même entre eux, à l'intérieur de l'entreprise.

Tout récemment, la dernière école bilingue français-hongrois de Budapest, fréquentée essentiellement par des élèves hongrois pour bien maîtriser les deux langues, a été fermée. Les élèves ont été priés de rejoindre une des nombreuses écoles bilingues anglais-hongrois financées par l'Ambassade des États-Unis. A partir de l'année scolaire 2004-2005, l'Ambassade de France a retiré son soutien de l'ordre de 12 000 € à l'école franco-hongroise, ce qui a mis cette école dans une situation impossible. Devant la protestation des parents d'élèves, l'Ambassade de France a fait savoir que l'aide à cette école a été retiré sur ordre venant de Paris...

Comment on dit en espéranto « se saborder »?

# Tintin au Tibet

Michel Dechy

Le club Lille Villeneuve Espéranto, avec la collaboration des éditions CASTERMAN, a permis la sortie de la traduction en espéranto de l'album « Tintin au Tibet »

La date, fin mars 2005, et le lieu de sortie de cet album permettent aussi de mettre en relief le centenaire du 1er « congrès universel » d'espéranto qui eut lieu en 1905 à Boulogne sur mer ; plus de 600 délégués venus de 20 pays différents se réunissaient pour la 1ère fois et se rendaient compte qu'au-delà de leurs langues maternelles différentes, ils se comprenaient et pouvaient rêver d'un monde plus humain où les barrières des langues seraient moins difficiles à franchir. Depuis, chaque année, sauf en cas de conflit majeur et généralisé, il y a un congrès mondial qui réunit

souvent plusieurs milliers de participants venus de plus de 60 pays différents, sans bien sûr l'aide ou le besoin d'interprètes.

Cet album met en relief l'amitié entre les hommes : Tintin qui part au secours de son ami Tchang bien sûr, mais aussi Tintin et le Capitaine Haddock qui restent unis en dépit de toutes les difficultés. On peut y voir encore l'accueil de la différence puisque le Yéti participe au sauvetage du seul survivant de la catastrophe.

Langue internationale oblige, ces exemplaires édités pourront être vendus dans le monde entier et plusieurs conférences et fêtes de sortie sont prévues pour accompagner l'événement. Je dois en faire une à Lisbonne en avril prochain, profitant d'un voyage pendant les vacances de printemps.

Nous pensons aussi utiliser cette

BD, et d'autres, comme outil pédagogique : soit en ayant pour but d'être capable de la lire à l'issue d'un stage de découverte de l'espéranto d'une semaine (avec le support de la version dans sa propre langue), soit en l'utilisant comme outil de conversation et d'approfondissement pour ceux qui ont déjà quelques connaissances de l'espéranto.

Enfin un grand bravo au traducteur, Hervé Gonin, qui avait déjà traduit le 1er Tintin en espéranto, édité en 1981 (la *krabo kun oraj pinĉiloj*).

La Nigra Insulo ( L'Île Noire) avait été éditée en 1987 pour fêter le centenaire du 1er livre, écrit par Zamenhof, paru en russe et présentant l'espéranto en 1887.



**Société québécoise d'espéranto**  
**Esperanto-Societo Kebekia**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Mise en page par Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Boris-Antoine Legault (Vice-Président), Jérôme Frédéric Bouchard (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Martin Benoit (conseiller).

*La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Paĝaranĝo farita per Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Jérôme Frédéric Bouchard (secrétaire), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Boris-Antoine Legault (konsilanto).*

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2005.08.20

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca) • [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)

# Primaj nombroj, mirindaj kaj misteraj

Francisko Lorrain \*

*Kio estas prima nombro? Ĉu estas senfina vico da primoj? Jen fin-fine respondoj al du el viaj plej esencaj demandoj! Al viaj aliaj gravaj demandoj, tamen, ne serĉu ĉi-sube respondojn. Fakte, post legado, vi konstatos, ke eĉ pli da senrespondataj demandoj kaj nesolvitaj misteroj nun pliriĉigas vian vivon!*

## Aritmetiko

Aritmetiko estas la studo de naturaj entjeroj: la nombroj 0, 1, 2, kaj tiel plu. Tiu scienco estas ne nur bazlerneja afero. Ĝi ankaŭ estas fako de kleregaj matematikistoj!

Vastasence, aritmetiko studas ankaŭ negativajn entjerojn, kaj eĉ frakciojn, sed ĉi tie mi parolos nur pri naturaj entjeroj.

## Primaj nombroj

Parto de aritmetiko estas la studo de primaj nombroj. Kio estas prima nombro?

**DEFINO.** *Prima nombro, aŭ plimallonge primo, estas entjero pli granda ol 1, kiu divideblas (sen resto) nur per si mem kaj per 1.*

Jen, vicigitaj, la unuaj primoj:  
2, 3, 5, 7, 11, 13, 17, 19, 23...

Ĉiuj aliaj entjeroj de 1 ĝis 23 estas neprimaj. La nombro 2 estas la sola para primo: ĉiuj aliaj paraj nombroj (4, 6, 8, ktp) divideblas per 2, do ne estas primaj.

Kial ne inkluzivi 1 inter la primoj? Ni baldaŭ vidos la kaŭzon de tiu ekskluzivo.

## Produotoj de primoj

Gravega fakto estas, ke ĉiu neprima entjero pli granda ol 1 estas produkto de du aŭ pli primoj. Ekzemple,

$$\begin{aligned}4 &= 2 \times 2, \\6 &= 2 \times 3, \\8 &= 2 \times 2 \times 2, \\9 &= 3 \times 3, \\12 &= 2 \times 2 \times 3,\end{aligned}$$

kaj tiel plu. Oni povas similmaniere malkomponi ĉiujn neprimajn entjerojn pli grandajn ol 1. Jen, ekzemple, malkomponaĵo de 234 en primajn faktorojn:

$$\begin{aligned}234 &= 2 \times 117 \\&= 2 \times 3 \times 39 \\&= 2 \times 3 \times 3 \times 13.\end{aligned}$$

Jen nun gravega teoremo pri tiuj malkomponaĵoj.

**FUNDAMENTA TEOREMO DE ARITMETIKO.** *Ĉiu neprima entjero pli granda ol 1 havas nur unu malkomponaĵon en primajn faktorojn (vicigitajn laŭ kreskanta ordo).*

Mi ne pruvos ĉi tiun teoremon ĉi tie. Ĝi pruveblas per elementaj rimedoj, sed tio postulus tro da spaco. Tamen ni povas nun kompreni, kial oni ne konsideras 1 kiel primon: ĉar 1 estus sensignifa faktoro en malkomponaĵo de nombro en primajn faktorojn.

## Malfinio da primoj

Matematikistojn fascinas malfinio. Ĉu la vico de ĉiuj primoj estas senfina? La intuicia respondo estas: jes. Kaj tio ĝustas. Mi tuj pruvos tion.

**TEOREMO.** *La vico de ĉiuj primoj estas senfina.*

**PRUVO.** Jen kiel EŬKLIDO pruvus tiun teoremon en la -3a jarcento, en siaj famaj *Elementoj*.

(a) Ni supozu, ke la vico de primoj havas finon. Ekzemple, ni supozu, ke

la solaj primoj estas 2, 3 kaj 5. (1)

Ni vidos, ke ĉi-lasto aserto kondukas al absurdaĵo. Alivorte, ni pruvos la teoremon per redukto al absurdo.

(b) La aserto (1), kiun ni pruvcele momente akceptas, sekvigas, ke

ĉiu entjero pli granda ol 5 estas neprimo, do estas produkto de du aŭ pli primoj. (2)

(c) Ni konsideru nun la nombron

$$x = 2 \times 3 \times 5 + 1. \quad (3)$$

Ĉi tiu  $x$  estas entjero pli granda ol 5. Do, laŭ (2),

$x$  nepre divideblas (sen resto) per almenaŭ unu el la tri primoj (1). (4)

(sekvo...)

\* La enhavo de tiu artikolo estas tiu de vulgariga prelego farita de la aŭtoro en Okemo (Vermonto, Usono), la 10<sup>ma</sup> de oktobro 2004.

# Primaj nombroj... (sekvo)

## Francisko Lorrain

(d) Ni testu la aserton (4). Ni testu unue, ĉu 2 divizoras en  $x$ :

$$\frac{x}{2} = \frac{2 \times 3 \times 5 + 1}{2} = 3 \times 5 + \frac{1}{2}.$$

Do 2 ne divizoras en  $x$ . Ni testu nun, ĉu  $x$  divideblas per 3 aŭ 5:

$$\frac{x}{3} = \frac{2 \times 3 \times 5 + 1}{3} = 2 \times 5 + \frac{1}{3},$$

$$\frac{x}{5} = \frac{2 \times 3 \times 5 + 1}{5} = 2 \times 3 + \frac{1}{5}.$$

Do  $x$  divideblas per neniu el la tri primoj (1). Tio kontraŭdiras la superan aserton (4). Ni alvenis al absurdaĵo. Nia aserto (1) malveras.

Se anstataŭ supozi, kiel en (1), ke estas nur tri primoj, ni supozintus, ke estas nur 137 primoj (aŭ ajna alia finia nombro da ili), ni similmaniere alvenus al absurdaĵo. Konklude: ekzistas malfinio da primoj, k. e. p. (« kio estis pruvota »).

## Formulo naskanta primojn

EŬKLIDO kaj, longan tempon post li, pastro Marin MERSENNE (1588–1648) studis la formulon

$$2^p - 1 \text{ (kie } p \text{ estas primo). (5)}$$

Tiajn nombrojn oni nomas mersenaj.

Unuavide ŝajnas, ke ĉiuj mersenaj nombroj estas primoj: ekzemple,

$$\begin{aligned} 2^2 - 1 &= 2 \times 2 - 1 = 3 \text{ (primo),} \\ 2^3 - 1 &= 2 \times 2 \times 2 - 1 = 7 \text{ (primo),} \\ 2^5 - 1 &= 32 - 1 = 31 \text{ (primo),} \\ 2^7 - 1 &= 128 - 1 = 127 \text{ (primo).} \end{aligned}$$

Kontraste, kun neprimaj potencigantoj, oni ricevas, ekzemple

$$\begin{aligned} 2^4 - 1 &= 15 = 3 \times 5 \text{ (neprimo),} \\ 2^6 - 1 &= 63 = 3 \times 3 \times 7 \text{ (neprimo),} \\ 2^8 - 1 &= 255 = 3 \times 5 \times 17 \text{ (neprimo),} \\ 2^9 - 1 &= 511 = 7 \times 73 \text{ (neprimo).} \end{aligned}$$

Fakte, tamen, ne ĉiuj mersenaj nombroj estas primoj. Ekzemple,

$$2^{11} - 1 = 2047 = 23 \times 89.$$

Sed multaj mersenaj nombroj ja estas primoj.

La plej granda prima mersena nombro trovita ĝis nun estas

$$2^{20\,996\,011} - 1.$$

Ĉi tiu nombro grandegas: ĝi havas 6 320 430 dekmajn ciferojn! Oni pruvis, ke ĝi estas primo, en decembro 2003.

## Grandaj primoj: kial?

Kial grandaj primoj interesas matematikistojn? Unue, ili estas interesaj, se ili kalkuleblas per simpla formulo, kiel la mersena (5).

Due, grandaj primoj havas grandan praktikan valoron kiel ŝlosiloj en ĉifrado. Komercaj kaj registaraj aŭtoritatoj, inter aliaj, serĉas plej eble grandajn primojn por ĉifri kaj malĉifri sekretajn mesaĝojn.

En 1999 la *Electronic Frontier Foundation* (EFF), asocio por defendo kaj disvastigo de Interreto, anoncis, ke mecenato donacis al ĝi monon por la sekvaj

premioj, kiuj estas por primoj kun pli ol la menciataj nombroj da dekmaj ciferoj:

$$\begin{aligned} 50\,000 \text{ \$ pli ol } 1\,000\,000 \text{ cif.,} \\ 100\,000 \text{ \$ pli ol } 10\,000\,000 \text{ cif.,} \\ 150\,000 \text{ \$ pli ol } 100\,000\,000 \text{ cif.,} \\ 250\,000 \text{ \$ pli ol } 1\,000\,000\,000 \text{ cif.} \end{aligned}$$

La premioj kumuleblas. La unua premio jam estis atribuita en 1999. Sed la aliaj ankoraŭ ne. Do ŝaltu viajn komputilojn...

## NESOLVITAJ KONJEKTOJ

Jen kelkaj ankoraŭ ne klarigitaj misteroj rilate primojn.

### Mersenaj primoj

Ĉu la mersena formulo  $2^p - 1$  ( $p$  prima) naskas malfinion da primoj? Oni ne scias. Ĉu la sama formulo naskas malfinion da neprimoj? Nek tion oni scias.

### Goldbach-a konjekto

Christian GOLDBACH (1690–1764) konjektis, ke ĉiu para entjero pli granda ol 2 estas sumo de du primoj. Ekzemple,

$$\begin{aligned} 4 &= 2 + 2, \\ 6 &= 3 + 3, \\ 8 &= 3 + 5, \\ 10 &= 3 + 7 = 5 + 5, \\ 12 &= 5 + 7, \\ &\dots \\ 22 &= 3 + 19 = 5 + 17 = 11 + 11, \end{aligned}$$

kaj tiel plu. Oni neniam trovis paran entjeron pli grandan ol 2, kiu ne estas sumo de du primoj. Ĝis nun neniu sukcesis pruvi la goldbach-an konjekton, nek ties negacion.

# Primaj nombroj... (sekvo)

Francisko Lorrain

## Ĝemelaj primoj

Ĝemelaj estas du primoj, kies diferenco estas nur 2. Ekzemple, jen la vico de la primoj, kun streketoj inter ĝemelaj primoj:

2 3–5–7 11–13 17–19  
23 29–31 37 41–43 47  
53 59–61 67 71–73 79  
83 89 97 101–103 107–109 113...

Estas multaj tiaj paroj. Ĉu ekzistas malfinio da ili? Alia nesolvita mistero!

## KONKLUDO

Eĉ bazlernejaj lernantoj konas primojn, kaj povas kompreni almenaŭ la du lastajn konjektojn.

# @ffichez-vous!

Jérôme F. Bouchard

Avoir comme adresse « vous@esperanto.qc.ca » vous intéresse? La SQE a décidé d'offrir ce service à l'ensemble de ses membres.

**Comment ça fonctionne?** La SQE n'a pas de serveur courriel, il s'agit d'un renvoi. Par exemple, si vous avez comme adresse « vi@hotmail.com » et que vous créez le renvoi « vi@esperanto.qc.ca », tout message envoyé à « vi@esperanto.qc.ca » sera automatiquement redirigé vers « vi@hotmail.com ».

**Quel est l'avantage?** Afficher votre appui pour l'espéranto. Ceci

Tamen, surprize, tiuj problemoj ĝis nun superis la kapablojn eĉ de la plej grandaj matematikistoj. Tio estas parto de la allogo de primaj nombroj por multaj homoj.

## BIBLIOGRAFIO

BAVANT, Marc, *Matematika vortaro kaj oklingva leksikono*, Dobřichovice (Prago), Kava-Pech, 2003.

COURANT, Richard, kaj ROBBINS, Herbert, *What Is Mathematics? An Elementary Approach to Ideas and Methods*, Londono, Oxford University Press, 1941.

DELAHAYE, Jean-Paul, *Merveilleux nombres premiers ; voyage au cœur de l'arithmétique*, Parizo, Belin, 2000.

permet aussi de s'affranchir un peu des serveurs courriels. Ainsi, si vous décidez d'abandonner Hotmail vous n'aurez pas à aviser les personnes qui ont votre adresse «@esperanto.qc.ca» mais uniquement à modifier le renvoi.

**Est-ce stable?** Oui, nous l'utilisons depuis plus d'un an déjà.

**Combien ça coûte?** C'est gratuit.

**Comment faire?** Envoyez un message à jero@esperanto.qc.ca en indiquant quelle adresse vous voulez avoir et à quelle autre adresse faire suivre les courriels.

# Esperanta klubo ĉe McGill!

Leonido

Mi studas ĉe la universitato McGill. Kun tri gesamideanoj, mi antaŭ nelonge starigis esperantan klubon en la universitato.

Niaj planoj enhavas senpagan kurson de Esperanto por komencantoj, renkontojn por diskuti pri esperanto kaj pri la esperanta movado, kaj ankaŭ esperantajn kulturajn vesperojn. Ni malstreĉe kunlaboros kun aliaj kluboj jam ekzistantaj, precipe la klubo de la universitato de Montrealo.

Se vi aŭ unu el viaj geamikoj studas ĉe McGill kaj interesiĝas pro esperanto, la klubo povas esti kontaktita per retroŝto: leonidus@hotmail.com (baldaŭ la klubo ekhavas specialan retroŝtadreson). Do, ne hezitu kontakti nin! Bonan someron!

# Assemblée générale annuelle

Soyez nombreux à faire votre devoir de membre en assistant à l'assemblée générale annuelle de la SQE. Si vous souhaitez faire partie du conseil d'administration, c'est votre chance : il y aura des élections...

Quand? Le 9 sept. 2005 à 20h  
Où? Au local du club (6358-A rue de Bordeaux, Montréal)

# Forumo pri monda demokratio en Montrealo

Normand Fleury

*L'auteur tente de présenter l'espéranto lors du Forum sur la démocratie mondiale, à Montréal, rencontre bien sûr gênée par les barrières linguistiques...*

Mi plurfoje partoprenis Univerŝalan Kongreson de Esperanto aŭ aliajn E-renkontiĝojn kaj foje fakajn konferencojn sed malofte ĝuis la okazon ĉeesti kiel delegito de KEA-UEA internacian konferencon.

Okazis fine de majo 2005 internacia konferenco pri monda demokratio. Ĉeestis ĝin 400 homoj reprezentantaj plej variajn organizojn neregistarajn, sociajn, ktp. El la 4-taga programo, nur unu sesio pritraktis la perdon de lingva diverseco en la mondo. Mi parolos pri tio pli poste. Mi diru unue, ke estis interpretado en tri lingvoj (angla, franca, hispana) nur de la plej grandaj kunsidoj. La aliaj laborgrupoj kaj kunvenoj okazis preskaŭ nur en la angla. La lingva nivelo estis tre varia kaj foje estis tre pene al mi kompreni la novzelandan akĉenton aŭ la niĝerian elparoladon de ĝi.

Dum la malferma sesio, mi aŭdis pri la respekto al diverseco de kulturoj, popoloj, lingvoj. Mi ankaŭ aŭdis tuj dekomence de iu fakulo usona « Mi neniam scias kiun lingvon uzi dum internacia konferenco »! La preleganto pri EŭroMed (Eŭropa Mediteranea organizo) el Tunizio, pardonpetis

pri sia uzo de la franca, kiu cetere ne estas sia denaska lingvo (tiel li diris) kaj poste la parolantino pri Mercosur (Sudamerika komerca organizo) pardonpetis pri la uzo de la angla anstataŭ la hispana. Do konstante estis lingvaj baroj, malfacilaĵoj. Rusino diris «spertuloj en lokaj aferoj ofte ne kapablas paroli fremdajn lingvojn kaj tiel neniam partoprenos en internaciajn konferencojn ».

Sed mi revenu al la kunsido pri lingva diverseco. Dekomence oni starigis la demandojn: Kial ni parolas pri kultura diverseco? Kio estas la plej granda danĝero rilate la kulturecan diversecon? Certe la okcidenta komerca kulturo estas videbla pli kaj pli ĉie sed ĉu la homoj estas devigataj aĉeti ĝin aŭ libere faras tion? Ĉu kulturo estas nur varo? Dum tiu kunsido estis prelegoj pri la neceso konservi la lingvan diversecon de la mondo; pri tio, ke perdo de lingvo estas perdo de kulturo; pri tio, ke ministroj pri kulturoj protektas sian nacian kulturecan merkaton sed ne la kulturecan diversecon aŭ minoritatojn de sia lando. Ĉu monprofita kulturo lasas lokon al loka popola kulturo?

Je la lasta parto de la kunsido eblis prezenti proponojn prezentotajn en la fina kunsido. Mi do proponis konsideri la uzon de neŭtrala internacia lingvo kiel solvon. Tuj du prelegantoj rebatis al mi ke Esperanto estas tro Eŭropa lingvo por esti

akceptata en la tuta mondo kaj ke la angla venkis kiel internacia lingvo. En mia propono mi ne menciis Esperanton! Ili ja sciis ke mi estas la delegito pri ĝi sed tute ne volis konsideri mian proponon. Mi vere miris, ke forumo pri demokratio ne konsideras, ke uzo de neŭtrala lingvo povus helpi al pli bona komunikado en la mondo. Mi povus esti tute malgaja pri la afero sed mi konsideras ke mi almenaŭ sukcesis prezenti, ke Esperanto estas alternativo.

Ĵurnalisto interesiĝis pri tio kaj mi havis « koridorajn konversaciojn » kun homoj kiuj volis aŭdi pli pri Esperanto. Estis ebleco lasi informilojn ĉe tabloj en la kongresejo kaj homoj forprenis plurajn dekojn da ili. Inter tiuj informiloj ni disdonis la manifeston de Prago en la franca kaj la angla.

Mi konscias ke mia partopreno ne portis grandan sukceson sed almenaŭ pluraj homoj (eble cento) eksciis pri Esperanto. Cetere, mi ja plene ĝuos mian venontan E-kongreson pensante ke mi profitas de la avantaĝoj de Esperanto dum la cetera mondo plu frontas lingvajn barojn ĉe siaj internaciaj kunvenoj. Ni esperu ke ili iam « vekigis ».

# LK kaj NASK

Phil Dorcas

Ankoraŭ restas sufiĉa tempo por registri al LK kaj NASK por 2005. La Landa Kongreso de ELNA estos en Auŝtino (Austin, Texas), Teksaso, la 10<sup>a</sup> - 13<sup>a</sup> de junio, 2005. Vidu <http://kongreso.hewgill.com/>

La informo tie estas havebla kaj Esperante kaj angle. Vi povas registri kaj pagi interrete. Rimarku, ke estos kelkaj kunsidoj por komencantoj, tial venu eĉ se vi estas vera komencanto! Mi iros.

NASK estas la Nord-Amerika Sumera Kursaro de Esperanto. Ĝi okazos dum tri semajnoj en belaj Vermonto la 4<sup>an</sup> ĝis 22<sup>an</sup> de julio, 2005. Vidu [www.esperanto.org/nask](http://www.esperanto.org/nask)

La informo tie estas haveble kaj Esperante kaj angle. Vi povas aliĝi kaj pagi interrete. Tio estas la plej fama intensa kurso en la mondo. Fakte, ĝi estas tri kursoj. Venu! Mi iros.

Amike,  
- filipo

## Resolucio 3690

Bob Williamson

Kiel redaktoro de « Inter Ni » mi fieras pro tio, ke la 5<sup>an</sup> de majo 2005 estis aprobita ĉi tiu rezolucio en la provinca parlamento de Nov-Skotio, Kanado:

*Konsidere ke la Esperanta lingvo estas simpla, fleksebla kaj belsona, kaj celas esti dua lingvo por ĉiu en la mondo; kaj*

*Konsidere ke la Esperanta-Rondo de Halifax-Dartmouth eldonas ĉiunmonatan revuon, kiu nomig(ĝa)s « Inter Ni » kaj kiun oni enpoŝtigas trans la nacio(n) kaj trans la mondo(n); kaj*

*Konsidere ke la apero de la maja numero 2005 (du mil kvin)*

*rimarkindigas la komencon de la dudeka eldonojaro de « Inter Ni » per ties 229-a (ducent dudek naŭa) numero :*

*Pro tio ni rezoluciigu ke la Nov-Skotia Ĉambro de Deputitoj gratulas la redaktorojn kaj la verkistojn de la Nov-Skotia esperanta eldonaĵo, « Inter Ni », kaj deziras al ili daŭran sukceson.*

La dulingva Rezolucio n-ro 3690 aperas en la provinca eldono de « Hansard » ĉe [www.gov.ns.ca/legislature/hansard/han59-1/house\\_05may05.htm](http://www.gov.ns.ca/legislature/hansard/han59-1/house_05may05.htm).

Ni danku kaj gratulu al [www.grahamstele.ca/esperanto.html](http://www.grahamstele.ca/esperanto.html)

## Nanatasis : nun havebla

Jérôme F. Bouchard

La fama fabelo verkita per la sinjoro Robert Dutil presita tutkoloro estas nun aĉetebla pere de la libro-servo.

Ĝis fine de 2005, membroj de ESK povas mendi Nanatasis kontraŭ 10 \$ + sendkostoj. Tio estas rabato de 5 \$...

## L'espéranto à la Grande Bibliothèque?

Jérôme F. Bouchard

Vous cherchez à faire d'une pierre deux coups? Allez faire un tour à la Grande Bibliothèque...

Et profitez-en pour y réclamer des livres sur l'espéranto : « L'Homme qui a défié Babel » (MASSON Henri, CENTASSI, René) ou « Le défi des langues » (PIRON, Claude). En effet, plus de gens se montreront intéressés par des livres sur l'espéranto, plus grandes sont nos chances que les bibliothécaires décident de rendre ces ouvrages disponibles.

À ce sujet, la SQE entreprendra cet été des démarches afin de léguer à la Grande bibliothèque notre collection de livres. Nous espérons ainsi rendre ces ouvrages (souvent rares) plus facilement disponibles à un plus grand nombre de personnes.

# Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
13 <sup>a</sup> junio 2005	Commensal *	18 h	Babila vespero
17 <sup>a</sup> junio 2005	MEDO **	20h	Komputiloj, linukso, skajpo... (Lasta vendredo estas 24 <sup>a</sup> de junio!)
9 <sup>a</sup> septembro 2005	MEDO **	20h	Esperanto-Societo Kebekia jarkunveno
12 <sup>a</sup> septembro 2005	Commensal *	18h	Babila vespero
30 <sup>a</sup> septembro 2005	MEDO **	20h	Kio novas en matematika mondo ?
8-9-10 oktobro 2005	NovJorkio, Usono		12 <sup>a</sup> Aŭtuna Renkontiĝo (ARE)
28 <sup>a</sup> oktobro 2005	MEDO **	20h	Artoj, ĉu necesas por la vivo?
12 <sup>a</sup> novembro 2005	MEDO **	19 h 30	Filma vespero
25 <sup>a</sup> novembro 2005	MEDO **	20h	Vojaĝoj, venu rakonti pri bela vojaĝo.
17 <sup>a</sup> decembro 2005	Botanika Ĝardeno †	18h	Decembra festo kaj komuna bufedo
27 <sup>a</sup> januaro 2006	MEDO **	20h	Lingvoj, kio bonas kaj malbonas en la konataj lingvoj de vi?
24 <sup>a</sup> februaro 2006	MEDO **	20h	Sportoj, ĉu vi estas sportema ?

\* **Commensal** : 1720, rue Saint-Denis, 845-2627, métro Berri-UQAM

18h *Libervola alveno por manĝo.*

Souper libre

19h *Amika babilado sen fiksita temo.*

Discussion amicale sans thématique

\*\* **Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**: 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

† **Botanika Ĝardeno (Jardin Botanique)** : 4101, rue Sherbrooke Est, Montréal

Métro Pie-IX, stationnement gratuit

ENTREZ PAR LES SERRES, derrière le bâtiment administratif.

Por komentoj, proponoj, demandoj : [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)



# Venu al la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto. (ARE) en Silvero, NovJorkio.

Normand Fleury

Eble vi pensos ke estas iom frue por paroli pri renkontiĝo kiu okazos nur en oktobro! Nu, vi komprenu ke ni devas mendi lokon en Silvero (Silver Bay, Lake George, NY) jam printempe por esti certa ke ni havos lokon por 50 personoj. Mi do petas ke vi rapide respondu al la subaj demandoj

*Mi volas mendi en Silvero (prezoj en USD + 5% imposto):*

## 1-Gastejo The Inn (inkluzivas 3 manĝojn, litaĵojn):

- unu/du-lita ĉambro kun privata banejo: po 97\$ persone/tage
- duobla-lita ĉambro kun privata banejo: po 97\$ persone/tage
- unu/du-lita ĉambro komuna banejo: po 83\$ persone/tage: jes/ne
- Junuloj ĝuas rabaton de 20%
- Mi estas vegetarano
- Mi estas vegano

Notu ke por la infanoj sub 4 jaroj estas senpage; 4-12 duonpreze.

## 2-Gastigado en 19 persona dometo, Hillcrest (sen manĝoj):

- lito en plur-persona ĉambro, po 40\$ persone/semajnfine
- faldo-lito (nur 3 haveblaj), po 20\$ persone/semajnfine
- manĝokupono matenmanĝo: po 6\$. Kiom da? \_\_\_\_\_
- manĝokupono tagmanĝo: po 8\$. Kiom da? \_\_\_\_\_
- manĝokupono vespermanĝo: po 12\$. Kiom da? \_\_\_\_\_
- Mi estas vegetarano
- Mi estas vegano

## 3-Gastigado en aliaj dometoj.

Estas pli ol 20 dometoj en Silvero. Prezo varias laŭ kiom da personoj povas loĝi ene. Grupiĝu kaj petu detalojn sed necesas mendi rapide jam printempe.

## 4- Grave

- Por teo aŭ kafo, 2\$ tage/persono. Kiom da? \_\_\_\_\_

Tiuj kiuj loĝas en The Inn ne bezonas pagi aparte por la manĝoj. Mi rekomendas al la Hillcrest-anoj aĉeti almenaŭ la kuponon por la dimanĉa vespermanĝo. Ne okazos komuna bufedo kiel en Okemo. Ne estas vendejo aŭ restoracio apud Silvero, necesas veturi al la urbo.

Fine, la kostoj inkluzivas la kunvenejoj. La kotizo falos de 25\$ al 5\$ (por ĉiuj) Donacoj estas bonvenaj por helpi subvencii alvenon de junuloj/studentoj. Kotizo pagebla surloke.

Esperante ke la informoj klaras. Ili aperos ĉe la retejo post iom da tempo: [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca).  
Sendu vian mendon al: [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)